

LA LITURGIO DE LA SANKTA VENDREDO

Enira Preĝo

Rigardu, Dio, ni petas, favore Vian familion,
por kiu nia Sinjoro Jesuo Kristo senhezite sin liveris en la manojn de la pekuloj
kaj transprenis la turmenton de la kruco,
Li, kiu vivas kaj regas eterne.
Amen.

aŭ:

Memoru, Dio, la grandajn farojn,
kiujn Vi verkis per Via kompato.
Protektu kaj sanktigu nin, Viajn subulojn,
por kiuj Via Filo Jesuo Kristo verŝis Sian sangon
kaj fondis la Paskajn misterojn,
kiu kun Vi vivas kaj regas eterne.
Amen.

Unua Legaĵo

Legaĵo el la libro de la profeto Jesaja

Jes 52,13 - 53,12

¹³ Jen Mia servanto havos sukceson,
li altiĝos kaj gloriĝos kaj staros tre alte.

¹⁴ Kiel multaj estis teruritaj, rigardante vin
(tiele lia aspekto estis malbeligita pli ol ĉe ĉiu alia
kaj lia eksteraĵo pli ol ĉe iu ajn homo),

¹⁵ tiel li saltigos pri si multe da popoloj;
reĝoj fermos antaŭ li sian buŝon,
ĉar ili vidos ion, kio ne estis dirita al ili,
kaj ili rimarkos ion, pri kio ili ne aŭdis.

¹ Kiu kredus al tio, kion ni aŭdis?
kaj super kiu malkaŝiĝis la brako de la Eternulo?

² Ĉar li elkreskis antaŭ Li kiel juna branĉo
kaj kiel radiko el tero senakva;
li ne havis staturon nek belecon;
ni rigardis lin, sed li ne havis aspekton, per kiu li plaĉus al ni.

³ Li estis malestimata kaj evitata de homoj,
viro suferanta kaj malsana;
kaj kiel iganta deturni de li la vizaĝon,
li estis malestimata,
kaj li havis por ni nenian valoron.

⁴ Vere, niajn malsanojn li portis sur si,
kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis;
sed ni opiniis lin plagita, frapita de Dio, kaj humiligita.

⁵ Tamen li estis vundita pro niaj pekoj,
dispremita pro niaj krimoj;
puno por nia bono estis sur li,
kaj per lia vundo ni saniĝis.

⁶ Ni ĉiuj erarvadis kiel ŝafoj, ĉiu iris sian vojon;
kaj la Eternulo ĵetis sur lin la kulpon de ni ĉiuj.

⁷ Li estis turmentata,
tamen li humiliĝis
kaj ne malfermis sian buŝon;
kiel ŝafido kondukata al buĉo
kaj kiel ŝafo muta antaŭ siaj tondantoj,
li ne malfermis sian buŝon.

→

⁸ De malliberigo kaj de juĝo li estas prenita;
kaj pri lia generacio kiu rakontos?
De sur la tero de vivantoj li estas fortranĉita,
pro la kulpo de mia popolo li estas frapita.

⁹ Inter malbonaguloj oni donis al li tombon,
inter riĉuloj post lia morto,
kvankam li ne faris maljustaĵon
kaj trompo ne estis en lia buŝo.

¹⁰ Sed la Eternulo volis tiel lin turmenti.
Kiam lia animo estos preninta sur sin elaĉetan punon,
li vidos idaron,
li longe vivos,
kaj la intenco de la Eternulo sukcesos per lia mano.

¹¹ La laborfrukton de sia animo li vidos, kaj satiĝos.
Per konigo de li Mia virtulo-servanto virtigos multajn;
kaj iliajn pekojn li portos sur si.

¹² Tial Mi donos al li multajn kiel lian parton,
kaj la potenculojn li dividos kiel akiron;
pro tio, ke li elmetis sian animon al la morto
kaj estis alkalkulita al krimuloj,
dum li portis sur si la pekon de multaj
kaj petis por la krimuloj.

Responsoria Psalmo

Antifono: → **ADORU 312.2**

IVa Pa - tro, en Vi - ajn ma - nojn mi
fi - de trans - do - nas min.

el Psa 31:

Psa 31,2.6.12-13.15-17.25

Vin, ho Eternulo, mi fidas, /
ke mi neniam estu hontigita; *
Per Via justeco savu min.

En Vian manon mi transdonas mian spiriton; *
Vi savas min, ho Eternulo, Dio de la vero.

Per ĉiuj miaj malamikoj mi fariĝis granda hontindaĵo por miaj najbaroj /
kaj teruraĵo por miaj konatoj. *
Kiu(j) vidas min sur la strato, tiuj forkuras de mi.

Oni forgesis pri mi en la koro, kiel pri mortinto; *
Mi fariĝis kiel rompita vazo.

Sed mi – mi fidas Vin, ho Eternulo; *
Mi diras: Vi estas mia Dio.

En Via mano estas mia sorto; *
Savu min de la mano de miaj malamikoj kaj persekutantoj.

Lumu per Via vizaĝo al Via sklavo, *
Helpu min per Via boneco.

Estu kuraĝaj, kaj fortaj estu viaj koroj, *
Vi ĉiuj, kiuj esperas al la Eternulo!

Dua Legaĵo

Legajaĵo el la letero al la Hebreoj

Heb 4,14-16; 5,7-9

Karaj gefratoj,

¹⁴ Havante do ĉefpastron grandan, trapasintan la ĉielon,
Jesuon, la Filon de Dio,
ni tenu firme nian konfeson.

¹⁵ Ĉar ni havas ĉefpastron ne tian, kiu ne povus simpatii kun niaj malfortaĵoj,
sed tentitan en ĉio tiel same, tamen sen peko.

¹⁶ Ni do alvenu kun kuraĝo al la trono de graco,
por ke ni ricevu kompaton kaj trovu gracon por ĝustatempa helpo.

⁷ En siaj karnaj tagoj,
preĝojn kaj petegojn oferinte,
kun forta kriado kaj larmoj, al Tiu, kiu povis lin savi el morto,
kaj aŭdite pro sia pia timo,

⁸ tiu, kvankam li estis Filo, tamen lernis obeon per tio, kion li suferis;

⁹ kaj perfektigite, li fariĝis la fonto de eterna savo al ĉiuj al li obeantaj.

Aklamo

-> ADORU 312.3

IIa
Kris - to es - tis o - be - e - ma
ĝis la mort', ĝis la kru-ca mort'.

Pro tio do Dio tre alte superigis *Lin*, /
 kaj donis al Li nomon, *
 kiu estas super ĉia nomo.

Pasiono:

- E – Evangeliisto
† – Jesuo
A – Aliaj personoj

E – La Pasiono de nia Sinjoro Jesuo Kristo laŭ Johano

Joh 18,1-19,42

- E – Jesuo foriris kun siaj disĉiploj trans la torenton Kidron,
kie estis ĝardeno, en kiun li eniris kune kun siaj disĉiploj.
Kaj Judas, lia perfidanto, konis la lokon; ĉar Jesuo ofte venis tien kun siaj disĉiploj.
Judas do, ricevinte la kohorton kaj oficistojn, senditajn de la ĉefpastroj kaj Fariseoj,
venis tien kun lanternoj kaj torĉoj kaj bataliloj.
Jesuo do, sciante ĉion, kio venos al li, paŝis antaŭen, kaj diris al ili:
† – Kiun vi serĉas?
E – Ili respondis al li:
A – Jesuon Nazaretan.
E – Jesuo respondis:
† – Mi estas tiu.
E – Kaj Judas, lia perfidanto, staris kun ili.
Kiam do li diris al ili: Mi estas tiu, ili malantaŭen ekpaŝis kaj falis sur la teron.
Tiam denove li demandis ilin:
† – Kiun vi serĉas?
E – Ili diris:
A – Jesuon Nazaretan.
E – Jesuo respondis:
† – Mi ĵus diris al vi, ke mi estas tiu; se do vi min serĉas, lasu ĉi tiujn foriri;
E – por ke plenumiĝu la vorto, kiun li diris: El tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi perdis neniun.
Simon Petro do, havante glavon, eltiris ĝin,
kaj frapis sklavon de la ĉefpastro kaj detranĉis lian dekstran oreleon.
La nomo de la sklavo estis Malĥo.
Jesuo do diris al Petro:
† – Metu la glavon en ĝian ingon; la kalikon, kiun la Patro donis al mi, ĉu mi ne trinkos?



- E – La kohorto kaj la mestro kaj la oficistoj de la Judoj kaptis do Jesuon kaj ligis lin,
kaj kondukis lin unue al Anas;
ĉar ĉi tiu estis bopatro de Kajafas, kiu estis ĉefpastro en tiu jaro.
Kajafas estis tiu, kiu donis konsilon al la Judoj,
ke estos bone, ke unu homo mortu por la popolo.



- E – Kaj Simon Petro sekvis Jesuon, kaj ankaŭ alia disĉiplo.
Ĉi tiu disĉiplo estis konata de la ĉefpastro,
kaj eniris kun Jesuo en la korton de la ĉefpastro;
sed Petro staris ekstere apud la pordo.
Kaj la alia disĉiplo, kiu estis konata de la ĉefpastro, eliris kaj parolis kun la pordistino,
kaj enirigis Petron.
La sklavino pordistino diris al Petro:
A – Ĉu vi ne estas ankaŭ el la disĉiploj de tiu homo?
E – Li diris:
A – Mi ne estas.
E – La sklavoj kaj la oficistoj, farinte karban fajron (ĉar estis malvarme),
staris kaj sin varmigis;
Petro ankaŭ estis kun ili, starante kaj sin varmigante.



- E – La ĉefpastro demandis Jesuon pri liaj disĉiploj kaj pri lia instruado.
Jesuo respondis al li:
† – Mi parolis malkaŝe al la mondo;
mi ĉiam instruis en la sinagogoj kaj en la templo, kie ĉiuj Judoj kunvenas;
kaj sekrete mi nenion parolis.
Kial vi min demandas?
Demandu tiujn, kiuj aŭdis, kion mi parolis al ili;
ili ja scias, kion mi diris.
E – Kaj kiam li parolis tion,
unu el la apude starantaj oficistoj per la manplato frapis Jesuon, dirante:
A – Ĉu tiel vi respondas al la ĉefpastro?
E – Respondis Jesuo al li:
† – Se mi malbone parolis, atestu pri la malbono; sed se bone, kial vi min frapas?
E – Anas sendis lin ligitan al la ĉefpastro Kajafas.



- E – Simon Petro staris kaj sin varmigis.
Oni do diris al li:
A – Ĉu vi estas unu el liaj disĉiploj?
E – Li neis, dirante:
A – Mi ne estas.
E – Unu el la sklavoj de la ĉefpastro,
estante parenco de tiu, kies orelo Petro detranĉis, diris:
A – Ĉu mi ne vidis vin kun li en la ĝardeno?
E – Petro do denove neis; kaj tuj la koko ekkriis.



E – Kaj oni kondukis Jesuon de Kajafas en la palacon; estis frumatene;
kaj ili ne eniris en la palacon, por ke ili ne malpuriĝu, sed povu manĝi la Paskon.

Pilato do eliris al ili, kaj diris:

A – Kian akuzon vi prezentas kontraŭ ĉi tiu viro?

E – Ili respondis kaj diris al li:

A – Se li ne estus malbonfaranto, ni ne transdonus lin al vi.

E – Pilato do diris al ili:

A – Vi mem prenu lin, kaj juĝu lin laŭ via leĝo.

E – La Judoj diris al li:

A – Ne estas permesate al ni mortigi homon;

E – por ke plenumiĝu la vorto de Jesuo, kiun li parolis,
montrante, per kia morto li mortos.



E – Pilato do reeniris en la palacon, kaj alvokis Jesuon, kaj diris al li:

A – Ĉu vi estas la Reĝo de la Judoj?

E – Jesuo respondis:

† – Ĉu vi tion diras de vi mem, aŭ ĉu aliaj diris ĝin al vi pri mi?

E – Pilato respondis:

A – Ĉu mi estas Judo? Via propra nacio kaj la ĉefpastroj transdonis vin al mi; kion vi faris?

E – Jesuo respondis:

† – Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo;
se mia regno estus el ĉi tiu mondo, miaj servantoj bataladus,
por ke mi ne transdoniĝu al la Judoj;
sed nun mia regno ne estas el ĉi tie.

E – Pilato demandis lin:

A – Ĉu vi do estas reĝo?

E – Jesuo respondis:

† – Vi diras, ke mi estas reĝo.

Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon, ke mi atestu pri la vero.

Ĉiu, kiu estas el la vero, aŭskultas mian voĉon.

E – Pilato diris al li:

A – Kio estas la vero?



E – Kaj dirinte tion, li eliris denove al la Judoj, kaj diris al ili:

A – Mi trovas en li nenian kulpon.

Sed estas ĉe vi kutime, ke mi liberigu al vi unu dum la Pasko:

Ĉu vi do volas, ke mi liberigu al vi la Reĝon de la Judoj?

E – Kaj ili kriis denove, dirante:

A – Ne ĉi tiun, sed Barabason.

E – Barabas estis rabisto.



- E – Tiam do Pilato prenis Jesuon kaj lin skurĝigis.
Kaj la soldatoj plektis kronon el dornoj kaj metis ĝin sur lian kapon,
kaj vestis lin per purpura mantelo;
kaj venis al li, kaj diris:
- A – Saluton, Reĝo de la Judoj!
- E – kaj ili frapis lin per la manplatoj.
Pilato do denove eliris, kaj diris al ili:
- A – Jen mi elkondukas lin al vi, por ke vi sciu, ke mi trovas en li nenian kulpon.
- E – Jesuo do eliris, portante la dornan kronon kaj la purpuran mantelon.
Pilato diris al ili:
- A – Jen la homo!
- E – Kiam do la ĉefpastroj kaj oficistoj lin vidis, ili kriis:
- A – Krucumu, krucumu lin.
- E – Pilato diris al ili:
- A – Mem prenu lin kaj krucumu lin, ĉar mi trovas en li nenian kulpon.
- E – La Judoj respondis al li:
- A – Ni havas leĝon, kaj laŭ tiu leĝo li devas morti tial, ke li pretendis esti Filo de Dio.
- E – Kiam do Pilato aŭdis tiun diron, li des pli timis;
kaj reenirinte en la palacon, li diris al Jesuo:
- A – De kie vi estas?
- E – Sed Jesuo nenion respondis.
Tiam diris Pilato al li:
- A – Ĉu vi ne parolas al mi?
Ĉu vi ne scias, ke mi havas povon krucumi vin, kaj povon liberigi vin?
- E – Jesuo respondis:
- † – Vi havus nenian povon kontraŭ mi, se ĝi ne estus donita al vi de supre;
tial tiu, kiu transdonis min al vi, havas la pli grandan pekon.
- E – Ĉe tio Pilato penis liberigi lin;
sed la Judoj kriis, dirante:
- A – Se vi liberigos tiun, vi ne estas amiko de Cezaro;
ĉiu, kiu pretendas esti reĝo, parolas kontraŭ Cezaro.
- E – Kiam do Pilato aŭdis tiun vorton, li elkondukis Jesuon,
kaj sidiĝis sur tribunala seĝo
en loko nomata La Pavimo, sed en la Hebrea lingvo Gabata.
Estis la Preparado de la Pasko, ĉirkaŭ la sesa horo.
Kaj li diris al la Judoj:
- A – Jen via Reĝo!
- E – Ili kriegis:
- A – Forigu, forigu, krucumu lin.
- E – Pilato diris al ili:
- A – Ĉu mi krucumu vian Reĝon?
- E – La ĉefpastroj respondis:
- A – Ni ne havas reĝon krom Cezaro.
- E – Tiam do li transdonis lin al ili, por esti krucumita.



E – Kaj ili prenis Jesuon;
kaj li eliris, portante sian krucon, al la loko nomata Loko de Kranio,
kiu estas en la Hebrea lingvo Golgota;
tie ili krucumis lin, kaj kun li du aliajn, ĉiuflanke po unu, kaj Jesuon meze.
Kaj Pilato ankaŭ skribis titolon, kaj surmetis ĝin sur la krucon.
Kaj estis skribite: JESUO NAZARETA, LA REĜO DE LA JUDOJ.



E – Tiun titolon multaj el la Judoj legis;
ĉar la loko, kie Jesuo estis krucumita, estis proksime de la urbo;
kaj ĝi estis skribita Hebree kaj Latine kaj Greke.
Tiam la ĉefpastroj de la Judoj diris al Pilato:
A – Ne skribu: La Reĝo de la Judoj; sed, ke li diris: Mi estas Reĝo de la Judoj.
E – Respondis Pilato:
A – Kion mi skribis, tion mi skribis.



E – Kaj la soldatoj, kiam ili krucumis Jesuon, prenis liajn vestojn,
kaj dividis ilin en kvar partojn, po unu parto por ĉiu soldato; kaj la tunikon;
sed la tuniko estis senkudra, desupre teksita tra la tuto.
Ili do diris unu al alia:
A – Ni ne disŝiru ĝin, sed lotu pri ĝi, kies ĝi estos;
E – por ke plenumiĝu la Skribo, kiu diras:
Ili dividis miajn vestojn inter si,
Pri mia tuniko ili lotis.



E – Tion la soldatoj faris.
Sed apud la kruco de Jesuo staris lia patrino,
kaj la fratino de lia patrino,
Maria, la edzino de Klopas,
kaj Maria Magdalena.
Jesuo, rigardante sian patrinon, kaj la apudstarantan disĉiplon, kiun li amis,
diris al sia patrino:
† – Virino, jen via filo!
E – Tiam li diris al la disĉiplo:
† – Jen via patrino!
E – Kaj de post tiu horo la disĉiplo akceptis ŝin en sian domon.



E – Jesuo, sciante, ke ĉio jam finiĝis, por ke plenumiĝu la Skribo, diris:

† – Mi soifas.

E – Kuŝis tie vazo plena de vinagro;

oni do metis spongon, plenigitan per la vinagro, sur hisopon, kaj levis ĝin al lia buŝo.

Kiam do Jesuo ricevis la vinagron, li diris:

† – Estas finite;

E – kaj, klininte sian kapon, li ellasis for la spiriton.



La Judoj, ĉar estis la Preparado, por ke la korpoj ne restadu sur la krucoj dum la sabato (ĉar la tago de tiu sabato estis granda tago), petis Pilaton, ke oni rompu iliajn krurojn, kaj forportu ilin. Tiam la soldatoj venis, kaj rompis la krurojn de la unua kaj de la alia krucumita kun li; sed kiam ili venis al Jesuo, kaj vidis, ke li jam mortis, ili ne rompis liajn krurojn; tamen unu el la soldatoj per lanco pikis lian flankon, kaj tuj elvenis sango kaj akvo.

Kaj la vidinto atestis, kaj vera estas lia atesto; kaj li scias, ke li diras la veron, ke vi ankaŭ kredu. Ĉar tio okazis, por ke plenumiĝu la Skribo: Osto en li ne estos rompita. Kaj ankoraŭ alia Skribo diras: Ili rigardos tiun, kiun ili trapikis.



Post tio, Jozef el Arimateo, kiu estis disĉiplo de Jesuo, sed sekrete pro timo antaŭ la Judoj, petis Pilaton, ke li povu forpreni la korpon de Jesuo; kaj Pilato permesis. Li do venis kaj forprenis lian korpon.

Venis ankaŭ Nikodemo (tiu, kiu unue venis al Jesuo nokte), portanta miksaĵon de mirho kaj aloo, ĉirkaŭ cent funtoj.

Ili do prenis la korpon de Jesuo, kaj ĉirkaŭvindis ĝin per tolaĵoj kaj aromaĵoj, laŭ la kutimo de la Judoj por entombigo. Kaj estis ĝardeno en la loko, kie li estis krucumita, kaj en la ĝardeno nova tombo, en kiu ankoraŭ neniu estis metita. Tien do, pro la Preparado de la Judoj (ĉar la tombo estis proksima) ili enmetis Jesuon.

La Grandaj Porpetoj

1

Ni preĝu, karaj gefratoj, por la sankta eklezio de Dio,
ke Li donacu al ĝi pacon sur la tuta tero,
ke Li unuigu kaj protektu ĝin,
/ kaj donu al ni vivon trankvilan kaj sekuran
je la laŭdo de Sia nomo.

Ni ekgenuu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
en Kristo Vi revelaciis al ĉiuj popoloj Vian gloron.
Bonvolu protekti, kion Vi favore kreis,
por ke Via eklezio sur la tuta tero restu en firma fido.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

2

Ni preĝu por nia papo Benedikto,
ke Dio, kiu elektis lin episkopo
/ gardu lin sana kaj forta,
por gvidi la sanktan popolon de Dio.

Ni ekgenuu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio, paŝtisto de Via popolo,
sur Via saĝeco ĉio estas bazita.
Bonvolu favore gardi nian papon Benedikton,
por ke per lia servo kresku la eklezio en kredo kaj amo.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

3

Ni preĝu por niaj episkopoj,
por ĉiuj pastroj, pastoroj, diakonoj kaj predikantoj,
/ kaj por ĉiuj aliaj,
kiuj servas la eklezion.

Ni ekĝenuu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
Via Spirito sanktigas la tutan eklezion kaj gvidas ĝin.
Bonvolu elaŭdi nian preĝon por ĉiuj funkciuloj en Via popolo,
por ke ili per Via graco servu al Vi fidele.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

4

Ni preĝu ankaŭ por la kateĥumenoj,
ke Dio malfermu iliajn korojn per Sia vorto,
ke Li donacu al ili per la bapto la pardonon de ĉiuj pekoj,
ke Li alprenu ilin en la patran domon,
/ por ke ili trovu la vivon
en nia Sinjoro Jesuo Kristo.

Ni ekĝenuu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
Vi ĉiam denove donas al Via eklezio fekundecon.
Bonvolu kreskigi en ĉiuj baptoj kredon kaj komprenon,
por ke ili, renaskitaj el la fonto de la bapto, estu Viaj infanoj.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

5

Ni preĝu por ĉiuj gefratoj, kiuj kredas je Kristo,
ke Dio ilin gvidu sur la vojo de la vero,
/ kaj konduku ilin kunen:
unu sankta eklezio.

Ni ekĝenuu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
Vi sola kapablas forigi skismojn kaj konservi unuecon.
Bonvolu kompati Vian kristanaron, kiu estas sanktigita per unu bapto.
Unuigu ĝin en la ĝusta kredo kaj kunigu ĝin per la ligilo de la amo.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

6

Ni preĝu ankaŭ por la judoj, al kiuj Dio parolis antaŭe.
Li konservu ilin en la fideleco al Lia interligo kaj en la amo al Lia nomo,
/ por ke ili atingu la celon
laŭ Lia destino.

Ni ekĝenuu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
Vi donis Viajn promesojn al Abraham kaj lia idaro.
Bonvolu elaŭdi la preĝon de Via eklezio
por la popolo, kiun Vi plej frue elektis Via propraĵo.
Venigu ĝin al la abundo de Via savo.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

7

Ni preĝu por ĉiuj, kiuj ne kredas je Kristo,
ke la Sankta Spirito ilin lumigu,
/ kaj ilin konduku
sur la vojon de la savo.

Ni ekĝenuu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
bonvolu asisti al ĉiuj, kiuj ne konfesas Kriston.
Ili vivu kun sincera koro antaŭ Vi kaj trovu la veron.
Sed al ni donu, ke ni pli kaj pli profunde komprenu la misteron de Via vivo
kaj kresku en amo frateca,
por ke ni fariĝu pli kaj pli fidindaj atestantoj de Via boneco.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

8

Ni preĝu por ĉiuj, kiuj ne ekkonas Dion,
ke ili, per Lia helpo, obeu al sia konscienco,
/ kaj per tio alvenu al Dio,
la Patro de ĉiuj homoj.

Ni ekĝenuu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
Vi kreis la homon, ke li serĉu Vin kaj trovu ripozon en Vi.
Bonvolu montri Vin el la signoj de Via kompato kaj en la faroj de Viaj fideluloj,
por ke la homoj, malgraŭ ĉiuj obstakloj, vin trovu,
kaj konfesu Vin vera Dio kaj Patro.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

9

Ni preĝu por la regantoj,
ke Dio direktu iliajn spiritojn kaj korojn laŭ la Dia volo,
/ por ke ili serĉu pacon kaj liberon
por la bono de ĉiuj popoloj.

Ni ekĝenu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
en Via mano estas la koroj de la homoj kaj la juro de la popoloj.
Bonvolu favore rigardi tiujn, kiuj regas nin,
por ke sur la tuta mondo regu sekuro kaj paco,
bonfarto de la popoloj kaj religia libero.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

10

Ni preĝu al Dio, la ĉiopova Patro, por ĉiuj, kiuj bezonas helpon.
Li purigu la mondon de ĉio erara.
Li forprenu la malsanojn kaj forpolu la malsaton.
Li disŝiru malĝustajn katenojn.
Li donu al la senhejmuloj sekuron,
al la pilgrimantoj kaj vojaĝantoj feliĉan revenon,
/ al la malsanuloj la sanon,
al la mortantoj la eternan vivon.

Ni ekĝenu!
Leviĝu!

Ĉiopova eterna Dio,
konsolo de la afliktitoj, forto de suferantoj,
bonvolu aŭskulti ĉiujn, kiuj vokas al Vi el sia angoro,
por ke ili en ĉia mizero spertu Vian kompaton.
Per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

La Levado kaj Honorado de la Kruco

-> **ADORU 312.4**

S: Vi-du la li - gnon kru - can, sur ki - u
latine: Ec-ce li - gnum cru - cis, in quo
 la sav' de l' mon - do ĝ pen - dis.
 sa - lus mun - di pe-pen - dit.
 K: Ve - nu, ve - nu, ni a - do - ru.
 Ve - ni - te ad - o - re - mus.

aŭ:

-> **ADORU 312.5**

S: Vi - du la kru - con, sur ki - u
 pen - dis la Mon - do - sa - van - to.
 K: Ve - nu, ni Lin a - do - ru.

dum oni honoras la krucon:

Mia popolo, ĉu mi kulpe venis -> **ADORU 302**

Agios o Theos / Sankta Dio -> **ADORU 036**

Vi, Dio sankta / Sviaty Bože -> **ADORU 284**

La Rito de la Komunio

C: Per savaj ordonoj admonitaj kaj per Dia instruo formitaj ni kuraĝas preĝi:

K: Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu Via nomo.
Venu Via regno.
Fariĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.

C: Liberigu nin, ni petas, Sinjoro, de ĉiuj malbonoj;
donu favore pacon en niaj tagoj,
por ke, helpitaj de Via kompato, ni estu ĉiam liberaj de la peko
kaj sekuraj kontraŭ ĉiu danĝero,
atendante la beatan esperon
kaj la alvenon de nia Savanto Jesuo Kristo.

K: Ĉar Via estas la regno
kaj la potenco
kaj la gloro
eterne.

C: Jen la Ŝafido de Dio,
jen tiu, kiu forigas la pekojn de la mondo.
Beataj la alvokitaj al la festeno de la Ŝafido.

K: Sinjoro, mi ne estas inda,
ke Vi eniru sub mian tegmenton,
sed diru nur unu vorton,
kaj resaniĝos mia animo.

Fina Preĝo

Ĉiopova, eterna Dio,
per la morto kaj resurekto de Via Filo
Vi donacis al ni la novan vivon.
Bonvolu konservi en ni tion,
kion Vi efikis per Via korfavoro,
kaj donu al ni
per tiu ĉi sakramento
la forton, servi al Vi fidele.
Per Kristo, nia Sinjoro.
Amen.

Bena Preĝo

Dio, nia Patro,
riĉa beno venu malsupren sur Vian popolon,
kiu celebris la morton de Via Filo
kaj atendas la resurekton.
Bonvolu donaci al ni pardonon kaj konsolon,
kreskon en la kredo
kaj la savon eternan
per Kristo, nia Sinjoro.
Amen.